

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj » junio-aŭgusto 2009

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Kiu estas indiĝeno? Kiu decidas?

Kiu estas aŭ ne estas indiĝena grupo aŭ individuo estas malfacile pritraktebla temo. Iuj landoj diras ke ili ne havas indiĝenojn sur siaj teritorioj, kvankam homogrupoj kiuj loĝas en tiuj landoj havas apartajn lingvojn kaj kulturojn kiuj ageme serĉas manierojn por ŝirmi siajn kulturojn kaj siajn rajtojn al siaj terenoj kaj natur-rimedo. (...) Unuiĝintaj Nacioj petas al la indiĝenaj grupoj ke ili sin indentigu.

(El Daŭra Forumo pri Indiĝenaj Demandoj, Unuiĝintaj Nacioj, 2003.)

Aŭdebligu! Aŭdu!—Sonregistroj en Papuo-Nov-Gvineo

Nun haveblaj en Papuo-Nov-Gvineo estas sonregistroj faritaj dum 1904, 1908, kaj inter 1995 kaj 1999 fare de la Aŭstra Akademio de Sciencoj. La registroj aŭdigas na “tok pisin,” la vaste parolata pidĝino de Papuo-Nov-Gvineo. Ili aŭdebligas ankaŭ ceremoniojn kiu ne plu okazas. Laŭ la raporto, kelkaj maljunuloj en tiu lando jam inspiriĝis pro la sonregistroj; ili denove praktikas malnovajn kaj preskaŭ forgesitajn kutimojn.

Ĝisdatigo el Bolivio

La starigo, per prezidenta dekreto, de “indiĝenaj universitatoj” en Bolivio jam aperis kiel ereto de monda novaĵo. Jen kelkaj informoj pri tiu ordono.

La “Universidad Tupac Katari” ofertas diplomojn pri agromonio (speciale terkultivado ĉe altaj ebenaĵoj), manĝaĵ-industrio, teks-industrio, kaj veterinaraj sciencoj. La ĉefaj lingvoj de la universitato estos la ajmara kaj la hispana, kvankam oni esperas ke la studolingvo post iom da tempo iĝos la indiĝena lingvo.

La “Universidad Casimir Huanca” ofertas diplomojn je manĝaĵ-industrio, rearbarigo, kaj fiŝobredado. La lingvosituacio estos simila al tiu de la Universidad Tupac Katari, sed la indiĝena lingvo estos la keĉua.

La “Universidad Boliviana Guarani y Pueblos de Tierras Bajas” (Universitato Bolivia Gvarania kaj de Gentoj de Malaltaj Terenoj) ofertas diplomojn je hidrokarbonoj,

rearbarigo, fiŝobredado, kaj veteraniaj sciencoj. La lingvosituacio estos simila al tiu de la Universidad Tupac Katari, sed la indiĝena lingvo estos la gvarania.

Ĉiuj studentoj devos prilabori projekton pri sia studotemo kaj prezenti ĝin per la indiĝena lingvo de la universitato por povi ricevi sian diplomon.

Ĉiu el la universitatoj konstruiĝos en la kamparo por plifortigi rilatojn inter urbaj kaj kamparaj socioj en la lando.

La bolivia registaro deklaras ke ĝi starigas la universitatojn por alidirekti erojn de la bolivia vivo laŭ la koncepto “malkoloniigado”.

Fonto (hispanlingva): Interreto—www.noŭpublic.com aŭgusto 2, 2008.

Tradukado en Afriko

Ngugi wa Thiongo, el Kenjo, estas Eminentia Profesoro de la Angla kaj Kompara Literaturo, kaj Direktoro de la Internacia Centro por Verkado kaj Tradukado ĉe la Universitato de Kalifornio, Irvin-a filio. Li verkis Wizard of the Crow (Sorĉisto de la Korvo) inter pluraj libroj.

Jen kelkaj citaĵoj el lia nova libro, Something Torn and New (Io Ŝirita kaj Nova.):

“Afrikaj lingvoj kaj literaturoj ne estas mortintaj; ili neniam mortis. La situacio estas ke la domon kiun ili konstruis, ekposedis eŭropaj lingvoj, kies sinteno estis ke afrikaj lingvoj estas kadavroj kiuj ne reviviĝos por rehavigi al si sian domon.”

“Je 2000, pluraj afrikaj kleruloj kaj verkistoj kunsidis en Eritreo kaj kundecidiĝis pri la Asmara Deklaro por Afrikaj Lingvoj kaj Literaturoj, dek-punta dokumento kiu komenciĝis per alvoko al afrikaj lingvoj por ke ili prenu al si la devon, defion, kaj respondecon paroli por la kontinento.” “Sed kiel 1000 lingvoj apenaŭ interkompreneblaj en la propraj landoj, parolos por kontinento? Ĉu Afriko iĝus malkompreneblejo? Ĉu la multobleco de afrikaj lingvoj en kaj inter ŝtatoj pliseverigos la dispecigon de la kontinento?

“La timo pri la pliseverigo de disigoj laŭ lingvaj linioj memevidente estas aŭtentika—sed la solvo ne estas daŭre enterigi tiujn lingvojn kaj la ilojn de afrika rememorado, sub eŭrop-rola paradizo. Male, kiel rimarkita ĉe la naŭa punkto de la Asmara Deklaro, la solvo okazos per tradukado.

“Tradukado estas la lingvo de lingvoj, lingvo per kiu ĉiuj lingvoj povas komuniki inter si (....) Per la tradukado de literaturaĵoj verkitaj rekte en afrikaj lingvoj, estiĝos kunhavata, moderna heredaĵo.”

Anoj de PIP, ni demandu al ni kiaj estas niaj komentoj pri la diversaj uzoj de lingvoj kaj de tradukado—kaj nepre sendu viajn pensojn al la redaktoro!

Turisto / Konsumanto

S-ro Chris HIGGINS verkis artikoleon el la revuo Americas (07 dec) pri turismo en Antiloj. Kvankam li ne rekte pritraktis indiĝenojn, li atentigis pri temoj kiuj povas rilati al indiĝenoj kaj iliaj kulturoj.

Diversaj ekonomie malfortaj landoj, lokoj, kaj gentoj penas uzi turismon kiel ilo por perlabori monon. Grandaj hoteloj, ŝikaj kazinoj, agrablaj ŝipoj, rapidaj avioj, vizitindaj lokoj...alogaj, ĉu ne?

Higgins, kanadano, komparas sian grandan landon kun la etaj insuloj de Antiloj, kaj li scivolas pri kio okazas ĉe ekonomio kiu havas turisman bazon...kiam la turistoj restas hejme pro altaj benzinoprezoj...kiam la preferoj de turstoj aliiĝas...

kiam eta turisma loko travivas problemon kiu malagrabiligas al turistoj tutan lokon aŭ regionon...kiam ekestas sanproblemon. En Kanado, se estas pluvegproblemo en iu loko, en alia loko la vetero estas tre agrabla. Tamen, sur insuleto la situacio ne tiel estas. Higgins avertas pri la nestabileco de turismo kiel industrio grava al la ekonomio de insulo.

Simile, Higgins vidas aŭ antaŭvidas problemojn por malgrandaj lokoj rilate ekologion. Kiom da homoj, konstruaĵoj, veturiloj, kaj tiel plu malgranda insulo aŭ simila loko kapablas havi sur aŭ en ĝi, ĝis kiam okazas gravaj problemoj, kaj ĝis kiu punkto turismo misproporcie rilatas al tiuj problemoj?

PIP kompreneble ne estas turisma organizo. Tamen, estas pluraj indiĝenaj grupoj, ekzemple vilaĝoj kaj reservejoj, kiuj volas uzi turismon por perlabori enspezon. Chris Higgins ĝuste pensigas nin pri tiu ebla elekto.

Subteno por Boŝmanoj

Dum interreta serĉado, aperis ĉe la ekrano de via redaktoro la organizo South African San Institute / Sudafrika Instituto por Boŝmanoj. Laŭ ĝia mempriskribo, SASI /SIB estas ne-registara organizo kiu subtenas la evoluon de la boŝmanoj, la tradiciojn, kulturon, kaj edukadon de la boŝmanoj, kaj kontakton inter apartaj boŝmanaj grupoj. Oni starigis la organizon je 1996.

Ĉu iu havas pliajn informojn pri la funkciado kaj efikeco de tiu organizo? La situacio de la boŝmanoj estas severega, kaj subteno de organizoj kiuj helpas ilin estas grava afero. Ankaŭ grave estas scii ĉu organizo kiu sin prezentas kiel helpa kaj bone organizita agas laŭ siaj pretendoj. Se vi havas informojn aŭ spertojn rilate South African San Institute / Sudafrika Instituto por Boŝmanoj, bonvole kontaktu la redaktoron. (Vidu la paĝon 8.)

Boŝmana kreado-mito

Laŭ la kreado-mito de la boŝmanoj de suda Afriko, homoj kaj bestoj iam vivis en la interno de la Tero. Ili loĝis kun la granda majstro kaj sinjoro de la vivo, Kaang. Ĉe la mondo-interno, homoj kaj bestoj pace kunvivis.

Ili komprenis sin unu la alian, al neniuj mankis io ajn, kaj estis sufiĉe da lumo, kvankam la suno estis ekster la Tero, kaj pro tio nevidebla al la homoj kaj bestoj.

Kvankam ĉio bone funkciis, Kaang deziris aliigi sian kreaĵon; li decidis terosurfaceni la homojn kaj bestojn. Kaang kreis grandegan kaj mirindan arbon. Ĉe la arbobazo li fosis grandan truon kiu atingis la terointernon kie estis la homoj kaj bestoj.

La homoj baldaŭ foriris la terinternon kaj grupiĝis ĉe la arbobazo kun Kaang. Poste, Kaang helpis la bestojn por ke ili surfaceniĝu, kvankam

kelkaj bestoj kapablis sendepende eksteriĝi laŭ la branĉoj de la arbego.

Kaang instruis al la homoj kaj bestoj por ke ili pace kunvivu. Li avertis al la homoj ke ili ne ekbrulu fajrojn, pro tio ke se ili faros tion, malbonegaĵo okazos al ili. La homoj tiel ĵuris. Kaang tiam foriris por gvati la vivestaĵojn de sia kaj ilia nova, tersurfaca mondo.

Kiam la suno alproksimiĝis sian subiron, la homoj ekpensis ke unuafoje ili travivos senlumecon. Ili timegis pro sia venonta nekapablo vidi unu la alian, kvankam la bestoj povis senlume vidi.

La homoj pro timo forgesis sian ĵuron al Kaang; ili ekbrulis fajrojn. Pro siaj fajroj, la homoj sentis varmecon, kaj vidis unu la alian. Tamen, la fajroj timigis la bestojn. Ili ekforiris, serĉante loĝlokojn malapudajn kaj sekurajn. Ekde la unua tago de tersurfaca vivo, la rilato inter homoj kaj bestoj, antaŭe amikema, iĝis timema.

Fonto: La Interreto: African Bushmen Creation Myth

Brila Papilo

Verkis en la gvarania (s-ro) Manuel Ortiz Guerrero. Tradukita en Esperanto el hispana traduko de la originala poemo.

Fonto (hispanlingva): Interreto—www.datamex.com.py guarani

Papilio kiu ĉe mia pado

aperas dancocelo,

Ŝirmita pro via flugilombro

mi esperas ke oni entombigos min.

Via nomo estas kiel sovaĝa mielo

por mia gorĝo;

ĝi dolĉigas

miajn larmojn kiam mi glutas ilin.

Por ke vi staru sur mia mano

mi sekvadas vin,

kaj vi, korĝoja,

flugas super mi.

Tra tiu dornokampo

kaj arbaro mi sekvas vin,

mia animo, ŝrumpiĝanta,
en miaj manoj sangas.
Kiel vi, papilio,
eble la dio-faritaj bestoj estas belaj.
Vi aperas ĉe mia ĝardeno por petoli.
Se vi plu brilos antaŭ miaj brilaj okuloj,
malantaŭ vin mi preskaŭ certe mortigos min.

Citaĵo el The Spiritual Heritage of the American Indian / La Spirita Heredaĵo de la Indiano, de Joseph Epes BROWN, 1982

La Okcidenta Subarkto—

Religiaj elementoj fundamentaj al la arktaj gentoj estas resumitaj, kun kelkaj varioj kaj aldonaĵoj, je la vivoj de la nordaj ĉasistoj algonkenaj kiuj sin adaptis al kondĉoj de la borealaj regionoj de la subarkto. Malgraŭ la ŝanĝoj faritaj dum longa historio de kontakto kun eŭro-amerikaj ĉasistoj, bestkaptistoj, lokaj komercistoj, kaj kristanaj misiistoj, la ĉas-agadoj de tiuj popoloj ankoraŭ estis prisorbitaj je sanktaj kredoj, kaj iliaj ritoj, plejparte similaj je tiuj de la arkto. Tamen, ĉi tie troviĝis riĉaj mitologioj de kreado, kun antropomorfa kreanto kiu troviĝas apud la pra-akvoj, akompanita de la nuntempaj plonĝbirdoj, kaj kiu portis al la akvosupraĵo la pra-koton el kiu la Tero kreiĝis. Ĉi tiu mita temo instruas, interalie, ke kreado estas ne nur antaŭa okazaĵo sed estas longdaŭra procezo dum kiu, kiel ĉiam, ĉiuj eroj de la kreado partoprenas.

Gravaj eroj el la Danco de la Blanka Cervohaŭto, de la hupaa-gento (norda Kalifornio, Usono).

La celo de la Danco de la Blanka Cervohaŭto estas la forviŝado de la malbono kiu aperis en la mondo pro la malobservado de la tabuoj.

El “Ceremonioj kaj Ritoj: Moviĝanta Vivo,” ĉapitro verkita de John C. MOHAWK en Native Universe: Voices of Indian America / Indiĝena Universo: Voĉoj de Indiana Ameriko

S-ro Mohaŭk priskribas tri periodojn dum la dek-taga ceremonio; tiuj periodoj estis tre interesaj al iu, kiu interesiĝas pri la homaro:

---Dum la malferma ceremonio, kelkaj dancantoj alte tenis tranĉilojn el obsidiano. Per siaj ritaj movoj, tiuj dancantoj tranĉile kvazaŭ-malfermis la cielon. Tiel, ĉiuj dancantoj kaj aliaj partoprenantoj atingis kaj ĉeestis la ĉefspiriton kaj aliajn spiritojn.

---La cervohaŭtoj, kiuj havis graven rolon rilate simbolismo kaj dekoracio, momente plivigligis la ceremonion ĉar oni dumtempe farĉis la haŭtojn kaj subtenis ilin per stangoj por kaŭzi naturecajn movadojn.

--- La dancantoj, per ligitaj kanuoj, transiris apudan riveron. La transiro de la rivero per la ligitaj kanuoj, dum kiu la partoprenantoj kvazaŭ-serĉis la foran bordon, helpis al la partoprenantoj por ke ili atingu pli altan esto-nivelon. Poste, dancantoj faris

“kontraŭan dancon,” kies fuŝaj pasoj kaj inversaj movoj helpis al la partoprenantoj kaj spektantoj tiel ke ili ne perdis sian humilecon.

Ĉiujn tradukojn al Esperanto faris la redaktoro.

PIP sendas nacilingvajn resumojn de La Kalumeto al diversaj universitatoj, UNO-fakoj, ne-registraj organizoj, kaj aliaj organizoj kiuj interesiĝas pri aŭ celas apogi indiĝenajn popolojn. Estas necese trovi personojn kiuj povas fari diverslingve la resumojn. Se vi povos helpi pri tio, bonvole anoncu vin!

Se vi havas artikolon, recenzon, tradukon, aŭ similaĵojn por aperigo en la bulteno, bonvole kontaktu:

(s-ro) Erik FELKER

ejfelker@dslextreme.com

414 E. Cedar Ave., Apt. 11

Burbank , CA 91501

U.S.A. / Usono